

Михаил Лермонтов,
Anĝelo

tradukita de Vasilij Devjatnin

En mezo de nokto, en blua
ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela
anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun'
en irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta
kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pe-
kantaĵn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo
loĝantaĵn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj te-
ra—
Kaj lia laŭdado ne estis mal-
vera.

Animon tre junan en brakoj li
tenis;
En mondo malgaja naskiĝi ĝi
venis.
Kaj sono de l' kanto en juna
animo
Restadis sen vort', sed kun vi-
va estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis
premata,
Je revo mirinda pri Di' pleni-
gata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sank-
ta sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de
l' tero.

...

Михаил Лермонтов,
La anĝelo

tradukita de Boris Mirski

Kun kanto solena en nokta
ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj
en rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga
ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda
Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al
ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna
anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda
dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de
l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

...

Михаил Лермонтов,
Ангел

По небу полуночи ангел летел,
И тихую песню он пел,
И месяц, и звезды, и тучи
толпой
Внимали той песне святой.

Он пел о блаженстве
безгрешных духов
Под кущами райских садов,
О Боге великом он пел, и
хвала
Его непритворна была.

Он душу младую в объятиях
нес
Для мира печали и слез;
И звук его песни в душе
молодой
Остался - без слов, но живой.

И долго на свете томилась
она,
Желанием чудным полна,
И звуков небес заменить не
могли
Ей скучные песни земли.

...

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 - †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (*1862 - †1938).*

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin.

*Traduko de la Rusa poemo "Ангел" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 - †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://donh.best.vuh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.

*Verkinto de tiu ĉi Rusa poemo estas МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 - †1841-07-27).*

Arg-1039-2110 (2014-06-03 12:23:12)

Pri la poeto Lermontov vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Миджаил_Lermontov.